

esperanto sub ——— LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

novembro-decembro 2007 • numero 90 | volumo 15 - numero 6



Maoria pahio



Maoria kunvenejo Marae ISSN 1039-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIJO

N^o 90 • Vol 15.6 • Novembro-decembro 2007

Redaktoro: Donald Broadribb

Eldonado:

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac; la programo uzita estas Melle; la ĉeftiparo estas Charis SIL.

Abonoj kaj membreco:

Membreco en AEA (inkl. *ENK*-on) AŭD\$40 (AŭD\$25 por pensiuloj kaj studentoj). Pagu al la sekretario. sekretario@esperanto.org.au

Simpla abono al ENK sen membreco kostas \$50. Pagu al Libroservo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio:

libroservo@esperanto.org.au

Esperanto sub La Suda Kruc estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

Esperanto sub la Suda Kruc

P.O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937

esk@esperanto.org.au

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

Enhavo © 2007, AEA & NZEA kaj la individuaj verkintoj.

En ĉi tiu numero

- Kongresu en Aŭklando (B. Fox).....3
Du novaj filmoj en Esperanto5
Kongresa mozaiko (red. K. Steele).6
Miranda Lutz, Paŭlo Gorny, Andrew Lutz, Alan Bishop, Jennifer Bishop, Indrani Bharry-Lall, Katarina Steele.....6
IJK 2007 (Andrew Lutz)8
Nova UEA honoriga sistemo.....9
Negrandaj informoj atentindaj10
Polaj kaj germanaj infanoj dum du semajnoj en Herzberg; Kantoj esperantaj; Du gazetoj pripensindaj; Universalaj Kongresoj 2008 & 2009
Interrete.....11
Folkloraj kantoj aŭskultebblas; *Firefox* nun en Esperanto; Nova aŭstralia retforumo; Nova retejo pri gazetoj; *Ifigenio en Taŭrido*; Ilustrita listo de esperantaj poŝtkartoj; Ilustrita listo de esperantaj poŝtmarkoj; Por saĝe elekti libron; listo de rete atingebblaj Esperanto-Asocioj
Konu viajn kungesamideanojn: Helen Palmer12
Via redaktoro en 1970.....15
Sperto de Margaret Chaldecott....16
Request for help in my research..16
Esperanto-biblioteko kaj -muzeo (Kam Lee).....17
El la regionoj18
Tasmanio; Vizito al Caboolture; Pasporta servo18
Oni lernas Esperanton ankaŭ en Nov-Kaledonio (Katarina Steele)20
La maorioj, polinezianoj (Henry Broadbent).....20
Instruado de Esperanto en la lernejoj de Perto (Katarina Steele)23
Skribas la legantoj27
La Ĝenerala Kunveno de AEA.....28
Indekso de *ENK* 200728

Limdato por la sekva ENK

La limdato por ENK januaro-februaro estas la 5a de decembro.

Kongresu En Aŭklando

de Brian Fox



Geografio

Aŭklando situas sur istmo. Haveno Waitemata ĉe la nordo ligas al Pacifika Oceano. Haveno Manukau ĉe la sudo fluas al Tasmana Maro. Havenponto al trans Waitemata, flughaveno apud Manukau. Insuloj flosas en la ekstera haveno. Vulkanaj montetoj staras tra la urbo. Plaĝoj kuŝas ĉirkaŭ pluraj el la cent sablaj strandoj. Pluv-arbaro en Montaro Waitakere tuŝas la okcidentan kvartalon. Miliono da homoj hejmas en Aŭklando: eŭropidoj, maorioj, pacifikanoj, aliaj.

Triba Historio

La maoria nomo por la loko estas Tamaki Makau-Rau kiu signifas Cent-Karula Tamaki. Aliuloj enviis posedon. Ĝi estas vojkrucio, ĉu per tero, ĉu per maro. Oni tiris pirogojn inter Waitemata kaj Manukau laŭ rojpadon. Vulkanaj cindroj fekundigis la grundon; estis facile kreskigi nutraĵon. Dum la musket-milito triboj el nordo

aŭ sudo pasis tra Tamaki Makau-Rau por ataki la alian. Ĉiu vulkana monteto fariĝis fortikaĵo. La loka tribo konstruis rifuĝejon en Montaro Waitakere.

Setleja Historio

Britoj fondis Wellington, Christchurch, Dunedin rekte el Britio. Sed Aŭklando nur propravole kreskis el komercistoj kaj loka tribo; enmigro de Kororareka kaj Sidnejo; registaro de 1840 ĝis 1865. Aŭklando estis dukultura urbo, maorioj provizis la nutraĵon, eŭropanoj la fabrikaĵojn. Fruaj okupoj estis lignosegado, ŝaf-farmado, tritikmuelado, veturado per akvo. Oni starigis ŝipkajojn en 1851; malfermis parlamenton en 1854, universitaton en 1882; instalis ĉevaltramojn en 1883. Trans Waitemata oni konstruis sukeruzinon en 1884 kaj grandan sekdokon en 1888.

Vulkanoj

Kvindek vulkanetoj naskiĝis dum la lastaj 50 mil jaroj, do tre junaj. Kutime vulkanoj ne mortas, nur dormas, sed tiuj 50 konusoj neniam reeruptis. Kial? Ĉar Tamaki estas baseno de unu vulkano, kiu eruptas en diversaj lokoj, averaĝe po ĉiu jarmilo. La eruptoj nun estas montetoj, insuloj, tof-ringoj, lagoj, lagunoj. La plej lasta, Insulo Rangitoto, kreskis el la maro antaŭ 600 jaroj kaj aktivis dum 300 jaroj. Ĝia nomo signifas Sanga Ĉielo.

Insuloj en La Golfo

Golfo Hauraki, ekster Waitemata, estas mara rezervejo. La golfo estas paradizo por jaktistoj. Dum zefiro oni

krozas tra la ventflanko de insuloj; en ŝtormo oni velas laŭ la ŝirmflanko. Pluraj insuloj estas grandaj, multaj ne. Juna Rangitoto konsistas el lafo kaj skorio, sed plantoj eĉ arboj kreskas inter bazalto. Oni forigis ratojn el preskaŭ ĉiuj insuloj, kaj kelkaj insuloj estas komisiitaj aziloj por minacataj birdoj kaj sfenodono t.e. tuataro.

Montaro Waitakere

Pluvarbaro kun indiĝenaj arboj, arbutoj, filikoj, lianoj restas en la plejparto de la montaro. 160 kvadrataj kilometroj de la montaro estas regiona parko kun 145 padoj por boŝpromenado inter kaŭrioj. Oni klopodas protekti indiĝenajn birdojn kontraŭ ekzotaj rabbestoj: rato, posumo, mustelo, erinaco; per programo "Arkeo en la Parko". Volontuloj traktas kaptilojn en tiu oazo. Kvin diglagoj liveras akvon al Aŭklando. Ĉe la okcidenta flanko troviĝas oceanaj strandoj, sed zorgu pri danĝeraj marondoj.

Multetna Urbo

Okazas iom da apartiĝo de taskoj laŭ sperto. Eŭropidoj deĵoras en oficejoj, maorioj laboras en metioj, pacifikanoj proletas en fabrikoj; kroatoj regas vinfaradon, hindoj lokajn butiketojn, ĉinoj restoraciojn. Britio posedas la ŝipojn, Aŭstralio la bankojn, Usono komunikilojn. Jes mi ja troas, sed ne multe. Azianoj studentas en la tri aŭklandaj universitatoj. Triono de kuracistoj estas eleksterlandaj. Kvarono de la urbanoj estas polinezia. Tamen ĉiuj geknaboj studas en la samaj lernejoj, kaj plenaĝuloj sportas en la samaj teamoj.

Mozaika Loĝantaro

Same kiel en aliaj grandaj urboj, Aŭkando ne estas ĉie sama. Malnova

mono loĝas en Remuera, nova en Takapuna. Pentristoj, ceramikistoj, verkistoj ĝuas la trankvilon inter boŝaj arboj en Titirangi. Pacifikanoj loĝas oriente de Manukau proksime al la flughaveno. Sportistoj preferas norde de Waitemata apud la golfo. Ponsonby pleniĝas de kafejoj, gejoj, aktoroj. Religianoj troviĝas laŭ la biblia zono en Mt Roskill. Suprenemaj mezkastuloj ŝatas renovigi apartamentojn el oficejoj en Parnell. Ĉinoj orientiĝis al Howick. Sudafrikanoj migris trans la havenponton. Nederlandanoj, kroatoj, aliaj eŭropanoj setlis en la deklivoj de Waitakere.



Aŭklando

Parkoj kaj Ĝardenoj

La Regiona Konsilantaro, dum multaj jaroj, aĉetis bienojn por krei 21 regionajn parkojn ekster Aŭklando, ĉe marbordoj, boŝo, insuloj; jen kun kiosko, jen laŭ naturo. Ĝi traktas mildajn farmbestojn por geknaboj. Lokaj instancoj regas ĝardenojn kaj parkojn tra la urbo, kaj prizorgas plaĝojn. Botanika ĝardeno prosperas ĉe Wiri apud la urbo. Ĉiujare dum unu semajno okazas granda ekspozicio, en Wiri, de pejzaĝa ĝardenado, kio trioble misnomiĝas "Ellerslie Flora Montro". La zoologia parko modernigis dum jardekoj ĝis la bestoj nun loĝas en pli propra etoso.

Bestoj kaj Birdoj

Lando de indiĝenaj birdoj kaj fremdaj bestoj. Ne ekzistas indiĝenaj mamuloj, krom maraj: balenoj, delfenoj, otarioj [similaj al fokoj], kiuj naĝas; kaj vesperto kiu flugas. Ĉe Haveno Manukau limozoj nutras sin dum somero por flugi al Siberio en aŭtuno kaj reveni en printempo. Porforioj kovas idojn laŭ flankoj de apudakva aŭtovojo kie katoj ne povas kapti ilin. Se vi trafas pramon al insulo en Golfo Hauraki, bonŝance delfenoj naĝos, saltos kaj plonĝos apud la pramo. Sur vulkanaj parkoj brutoj tondas la gazonon. En la kamparo ŝafoj, bovinoj, ĉevaloj paŝtas. Vidu kivion en bestoĝardeno, sed triste nenie videblas diorno t.e. moao.

Distraĵo

En la urbocentro: artgalerio por pentraĵoj, skulptaĵoj; du orkestroj, filharmonia kaj simfonia; kazino por forĵeti monon; teatroj por suspendi malkredon. Muzeo kun loka, oceania,

monda fakoj; tereno Motat pri setla vivo; mara muzeo ĉe la dokoj pri ambaŭ tradicioj; Kelly Tarlton por spekti marbestojn el travidebla tunelo; zoologia parko kun lokaj kaj mondaj bestoj. Kvindek kvar publikaj bibliotekoj en diversaj lokoj. Ok senpagaj televiziaj stacioj: TV One: por seriozuloj, TV2: por junuloj, TV3: miksaĵo, C4: rokmuziko, Maori: en la du lingvoj, TV8: ĉinlingva, Prime: el Aŭstralio, Triangle: el Eŭropo Usono Aljazeera Pacifiko.

Pejzaĝoj

Grimpu al sur Monto Eden por rigardi la krateron, kaj la pejzaĝojn trans la urbo, norden al Haveno Waitemata, urbocentro kaj havenponto, suden al Haveno Manukau kaj flughaveno, orienten al Rangitoto kaj aliaj insuloj, okcidenten al Montaro Waitakere. Kaj apude tra la istmo ĉien sterniĝas domoj. Pramo portos vin de la dokkajo al la insuloj; buso veturigos vin sudokcidenten al paco en la montaro. Kaj strandoj ĉieas. □

Du novaj filmoj en Esperanto

Gerda Malaperis & La Patro

Gerda Malaperis, bazita sur mondkale fama verko de Claude Piron. Ĝi daŭras 1 horon kaj 45 minutojn kaj estas vendata sur DVD. En la DVD vi trovos subtekstojn en 7 lingvoj, “malantaŭ la scenoj” kaj intervjuojn. Ĝi estas bonega instrumentaĵo por la instruistoj tutmonde. *La Patro* daŭras 40 minutojn. En la DVD vi trovos diversajn subtekstojn... malantaŭ la scenojn... intervjuojn... Kiam la pasintaj eraroj starigas malbonajn sentojn... Ĉu vi sukcesus pardoni? Larm-

oj, ĝojo, kontraŭaj sentoj. Ĉio povas okazi en via propra familio.

Informoj ĉe: <http://www.imagu.com.br/>



Kongresa mozaiko kompilis Katarina Steele



La ĉijara Universala Kongreso de Esperanto estis laŭvice la 92-a. Ĝi okazis inter la 4-a kaj la 11-a de aŭgusto en Jokohamo, Japanio.



Jenny kaj Alan

El la preskaŭ 2000 ĝiaj partoprenantoj 14 estis el Aŭstralio: Miranda kaj Andrew Lutz, Martin Gray, Richard Penman, Katja Steele, Indrani Beharry-Lall, Diane Lukes, Jenny kaj

Alan Bishop, Paul Gorny, Jonathan Moylan, Andrew Adams, Christine Hollis, partatempe Robert Budzul.

Jen kelkaj eretoj el la abundo de iliaj impresoj — ĉe la pli junaj ankaŭ pri la IJK en Vjetnamio.



En Jokohamo: Christine, Paul, Miranda, Martin

Ho ja, la ondoj de amikeco (kaj varm-egeco!) daŭris ek de la komenco de la



Miranda kaj vejo-prezidanto Hal Ly IJK en Hanojo ĝis la fino de la UK en Jokohamo. Du plenplenaj semajnoj da vivo en ondo de Esperanto! En Hanojo estis ondo de 7 partoprenantoj el Aŭstralio, eble la plej granda grupo de Aŭstraliaj partoprenantoj dum la historio de ĉiuj 63 IJKoj? Tie ni ĝoje instruis pri “biera horo” kaj la graveco de malvarma biero. Do, same kiel diras la T-ĉemizoj de kelkaj novaj amikoj ĉe la UK, al vi mi donas mian “JEN VIA SANO”. *Miranda Lutz*

Antaŭ la kongreso miaj vojaĝoj tra Japanio estis facilaj danke al la helpo de japanaj esperantistoj sen kies amikeco la sperto povus esti streĉa. Miaj transporto kaj loĝado ĉiam estis agrable aranĝitaj. Dum la UK amikeco estis tiel forta, ke neniam oni povis senti sin en fremda lando. Babilado en diversaj manĝejoj kun samideanoj de nekonataj landoj por mi estis agrabla plezuro. Interago dum la preparo de Internacia Ĥoro ankaŭ estis ĝuiga. *Paŭlo Gorny*

La vojaĝo en Esperantujo estis por mi ege ĝuiga pro la elkora bonvenigo kaj amikeco de niaj vjetnamaj kaj japanaj gastigantoj kaj amikoj. Kaj la IJK kaj la UK instruis multe pri la koncernaj lando kaj kulturo kaj estis plezuro trovi en la esperantistaro multajn

novajn amikojn. Certe muziko ludas grandan rolon en ambaŭ landoj, kaj la



Oceania kunsido

Artaj Vesperoj kaj koncertoj estis tre agrablaj. La IJK-ceremoniojn kiujn mi registris per film-aparato mi esperas montri al multaj hejmuloj per DVD aŭ rete. El la UK-programoj mi tre ŝatis la prelegon de lingvisto Ŝuntaro TIDAS, kiu temis pri Adpozicioj.



Esperanto-grupo en groto ĉe Golfo Halong

Mi bedaŭras ke ni ne povis vojaĝi iom pli tra la lando, mi esperas iam reiri! *Andrew Lutz*

Mi memoras la varmecon de la vetero kaj de la homoj! En la Internacia Ĥoro kantis kelkaj japanoj. Ne ĉiuj el ili legis muziknotojn sed ĉiuj ŝatis kanti, diligente ekzercis kaj sukcesis lerni la kantojn. Do finfine la Ĥoro bele kantis kvin kantojn dum la Internacia Arta Vespero. *Alan Bishop*

Ĉe UK mi ĉiam ĝuas renkontiĝon kun internacia amikaro. Por mi la plej gravaj sesioj temis pri lingvoinstruado — la Cseh-kurso de Grazina Opulskiene kaj la Cseh-seminario de Tereza Kapista, sed allogis min ankaŭ kantado de Internacia Esperanto-Ĥoro, ĉar ĝi estas vera ekzemplo de internacia, multkultura kunlaborado.

Jennifer Bishop



Katja en kimono

Mi ŝatis la kongresan programeron, kiam mi povis vesti min per kimono kaj libere uzi ĝin dum duonhora. Mi sentis min kiel vera japana virino, moviĝante en lignaj sandaloj per etaj paŝoj. Mi vojaĝis tra Japanio dum du semajnoj jam antaŭ la UK. Estis interresa sento ŝati demandi anstataŭ honti aŭ ĝeniĝi, ĉar mi ne sciis kien iri, kiel fari ktp. Mi ĝuis la demandadon, ĉar la japanoj ĉiam ege afable respondadis, helpis. Tio estis vere agrabla sperto! *Indrani Beharry-Lall*

El la UK-programoj pleje interesis min la porinstruistaj kaj Esperanto-familiaj aranĝoj. Mi observis la lin-

gvajn ekzamenojn de ILEI/UEA kaj almenaŭ poiomete vidis kiel instruas Grazyna Opulskiene (Cseh-metode), Katalin Kovats (uzante “Poŝamiko”-n kaj abundan perkomputile projekciitan materialon) kaj Sylvain Lelarge (multaj novaj ideoj). Estis agrable konatiĝi kun novaj Esperanto-familioj kaj el Eŭropo kaj el Azio, rerenkonti kelkajn el la jam konataj el ili.

Kiel unuafoja partoprenanto de Azia UK estis por mi nova la enhavo kaj de la nacia kaj de la internacia vesperoj. Ili ambaŭ estis altnivelaj.

Ĉu vi aŭdis pri lingvaj festivaloj? Mi jes — en la prelego de Dennis Keefe. Ĉe <www.linguafest.info> vi povas legi pri ili. Estus tre bone realigi ilin ankaŭ en Aŭstralio.

Katarina Steele

IJK 2007

raportas Andrew Lutz



Estis granda plezuro partopreni en la 63a Internacia Junulara Kongreso, ĉe Hanojo, Vjetnamo, kaj ĝi estis mia unua tutmonda evento por vidi la lingvo-kapablon.

Kvar membroj de la Melbourne Esperanto Kafo-Klubo vojaĝis al Hanojo kaj entute estis sep homoj el Aŭstralio. Ni certe renkontis multajn gesamideanojn kiuj tre afable faris la

eventon bonvenigema kaj amikema. La temojn Paco, Kunlaboro kaj Disvolviĝo mi opinias bonaj.



Golfo Halong ĉe la groto

Niaj gastigantoj ĉiam helpis nin pri la diversaj kulturaj fazoj kaj aspektoj de la ĉarma lando, kaj ni esperas sekvi ilian ekzemplon kiel esperantistoj. Multe ni ne vidis de la malurba parto de la bela lando kaj mi ŝatus revojaĝi al Vjetnamo, ankaŭ kiam la vetero estas pli malvarma. La diskonigo de Esperanto tie funkcias ege bone kaj ŝajnas al mi unu el la plej bonaj. Ni certas ke ni lernis kiel diskonigi Esperanton kaj uzi ĝin inter junuloj per multaj diversaj rimedoj, kiujn ĉi tie en Aŭstralio ni certe bezonas provi, por kreskigi la junan movadon esperantan.

Mi kaptis iom de la kongreso per filmilo kaj mi esperas ke ankaŭ videblos en *Youtube* aŭ *Farb-skatolo.net*. Do, se vi interesiĝas pri tio, bonvolu kontakti min por pli da informo.



Golfo Halong



Esperantistoj sur boato

Nova UEA honoriga sistemo

Dum la UK en Jokohamo la Komitato starigis novan formon de honorigo: "Diplomo pri Elstara Agado", pri kies aljuĝo decidis la Estraro.

Ĝiaj unuaj ricevantoj estas la germana Interkultura Centro Herzberg pro la decido de la urbo Herzberg oficiale deklari sin Esperanto-urbo; kaj s-ro Donald J. Harlow el Usono, pro sia pionira esperanta aktivado en

Interreto.

Jennifer Bishop honorita

Dum la ĉijara Universala Kongreso en Jokohamo la Internacia Esperanto-Instituto nomumis Jennifer Bishop kiel Honoran Membron. Estis okazigita festmanĝo, dum kiu transdoniĝis al ŝi la dokumento atestanta la honorigon. Por la okazo ŝi ricevis ankaŭ donacon de IEL. □



• Negrandaj informoj atentindaj

Polaj kaj germanaj infanoj dum du semajnoj en Herzberg

28 julio-11 aŭguste jam la duan fojon ripetigis la dulanda Somera Arbara Lernejo (*Salo*), kiu ĉiujare kunigas dum duona monato Esperanto-lernantajn infanojn inter 12 kaj 16 jaroj el la ĝemelurboj Góra (Pollando) kaj Herzberg (Germanio).

En siaj artikoloj la gazetaro emfazis, ke la ĉijara aranĝo karakteriziĝis per elstare riĉa programo prizorgita de la loka esperanta Interkultura Centro. La infanoj amuziĝis en glitejo kaj naĝejo, lernis arkopafi, dancis diverslandajn popoldancojn, vizitis bestoparkon, esploris groton, ekskursis al turismaj lokoj, publike koncertis en Esperanto kaj migradis en arbaro. Ne mankis, kompreneble, instrua parto, konsistanta el praktikado de la lingvo kaj fina ekzameno. La partopreno en la renkontiĝo estis senpaga, ĉar ĉiuj kostoj estis kovritaj de la du urboj, la Pol-Germana Junulara Fondaĵo kaj privataj sponsoroj.

Tre impresa estis la favoro de la urbestro, Gerhard Walter, kiu oficiale akceptis kaj regalis la gepartoprenantojn en la urbodomo, persone gvidis tablotenisan turneon (kaj eĉ ludis en ĝi kun la infanoj), disdonis pokalojn kaj donacojn, prezidis diversajn publikajn aranĝojn kaj plurfoje vizitis la kunvenojn. [Laŭ *Retinfo*] □

.....

Kantoj esperantaj

Mi jam trovis kantiston, kiu jam komencis kanti kaj surbendigi en studio

miajn Esperanto-kantojn. Lia nomo estas Jean-Marc Leclercq (Jomo), franca esperantista kantisto. Li jam surbendigis kvin kantojn kaj restas sep.

Pro tio bonvolu helpi min trovi personojn en via lando kiuj povos financi la produktadon de miaj Esperanto-kantoj sur kompaktdiskoj.

Afable via,
Theophile Mayoma Diankembo,
Kongo/Kinshasa
esperantoklubo_k@yahoo.fr □

.....

Du gazetoj pripensindaj

La gazeton *Juna Amiko* minacas pereoj pro manko de sufiĉe multaj abonantoj. Se vin interesas tiu tre aboninda periodaĵo, bonvolu pripensi pagi abonon.

La abonprezo de *Monato* altiĝos por 2008. Tamen, se vi pagos abonon antaŭ la 8a de novembro ĉijare, vi povos por 2008 pagi la ĝisnunan abonprezon. Menu ĉe <http://libroservo.esperanto.org.au> □

.....

Universalaj Kongresoj 2008 & 2009

La 93a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Rotterdam, Nederlando.

Dum la Kongreso en Jokohamo estis decidite, ke la 94a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bjalistoko, Polujo en 2009.

La 150-jara naskiĝtago de Zamenhof okazos la 15an de decembro 2009. Li naskiĝis en Bjalistoko, kaj la Kongreso tion memorigos.



• Interrete

- **Folkloraj kantoj aŭskulteblas:** Se vi uzas Broadband-on, vi povas aŭskulti aron da folkloraj kantoj en Esperanto, bele kantitaj, kaj ankaŭ trovi la tekston de la kantoj, ĉe: <http://www.esperanto.mv.ru/muziko/folkloro.html>.
- **Firefox nun en Esperanto:** La tre populara retlegilo (“retkrozilo”) Firefox nun senpage haveblas en Esperanto. La esperanta version funkcias tre bele per kaj Windows kaj per Macintosh. Por uzi ĝin, vi devas havi la plej novan version de Firefox, versio 2.0.0.7, elŝutebla ĉe: www.mozilla.com, kaj ankaŭ du programetojn akireblajn ĉe: <http://tradukado.esperanto.org.uy/el-349utado.html>, kie vi trovos instrukciojn en Esperanto. Ĝi petos vin elŝuti malgrandan programeton. Post tio, laŭ la instrukcioj vi devos elŝuti duan programeton. Tiu dua programeto estas ĉe urugvaja retsito en la hispana lingvo. Ĉe tiu retsito klaku sur “*instalar ahora*”, kio signifas “instalu nun”). Fininte la instaladon, en la menuo “Iloj” elektu la vorton “Esperanto”.
- **Nova retforumo aŭstralia:** Nova retforumo establiĝis ĉe: <http://australiforumo.freeforums.org/>
- **Nova retejo pri gazetoj:** La Esperanta Gazetejo, www.gazetejo.org, kolektas informojn pri esperantaj gazetoj. Ĝi ebligas al uzantoj trovi informojn pri multaj aktualaj esperantaj gazetoj, kaj celas fariĝi informejo pri ĉiuj. Krome, eblas surekrane legi plurajn el tiuj gazetoj.
- **Ifigenio en Taŭrido:** La klasika dramo *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe, tradukita de Zamenhof kaj eldonita en 1908, nun senpage elŝuteblas ĉe <http://www.gutenberg.org/browse/languages/eo>. Via redaktoro elkore rekomendas ĉi tiun klasikan verkon.
- **Ilustrita listo de esperantaj poŝtkartoj:** Ĉe <http://www.eventoj.hu/bildkartoj/index.htm> vi trovos “virtualan ekspozicion” de 1439 esperantolingvaj bildkartoj (poŝtkartoj).
- **Esperantaj poŝtmarkoj:** Granda nombro da pri-esperantaj poŝtmarkoj eldonitaj de diversaj landoj troveblas ĉe <http://dauphin.guy.free.fr/>. Tie vi trovos fotojn de la poŝtmarkoj, kaj ankaŭ detalojn de la eldonjaroj, la temo de ĉiu poŝtmarko, kaj aliaj informoj. (Pli da informo aperos en *ENK* januaro-februaro 2008.)
- **Por saĝe elekti libron:** Ĉe: <http://esperanto.net/literaturo/recenzoj.html#V> oni povas trovi tre grandan aron de recenzoj pri esperantolingvaj libroj. Se vi cerbumas, kiun romanon aŭ novelaron aŭ poemaron aĉeti kaj ĝui, ĉi tiu sito estas vera trezorejo. Pri preskaŭ ĉiu el la libroj troviĝas pluraj recenzoj, tiel ke oni povas legi diversajn taksojn kaj priskribojn, verkitajn de talentaj kaj trafaj recenzistoj.
- **Listo de rete atingeblaj Esperanto-asocioj:** Ĉe: [http://fr.wikipedia.org/wiki/Liste d'associations espérantistes](http://fr.wikipedia.org/wiki/Liste_d%27associations_esp%C3%A9rantistes) vi povas trovi ĝisdatigitan liston de la tre granda nombro de esperantaj asocioj kiuj havas retpaĝojn konsulteblajn. Vin eble mirigos la granda vario de asocioj, ekzemple ŝakista, astronomia, rotaria, sindikata, agrikultura, biciklista, kaj abundaj aliaj. Ankaŭ, kompreneble, de tre granda nombro de naciaj grupoj, de Sudkoreo, Hindio, Kroatio, Hungario, ...



• Konu viajn kungesamideanojn MIA VIVO

(la 8-an de septembro 2007)

Helen Palmer

Mi naskiĝis en Anglio kiel la dua el kvar gefiloj de Pat kaj Jack Palmer. Mi vivis tie la unuajn kvar jarojn de mia vivo kaj havas multajn rememorojn pri tiu tempo. Ekzemple, mi memoras trovi la razilon de mia patro (...mi staris sur seĝo, lavĉambra ŝranko...jen...) la sango fluis kaj ĝis hodiaŭ mi havas la cikatron. Aŭ bela estas la memoro pri mia lud-urso de tiuj jaroj...



Helen kiel infano

En 1964 mia patro klopodis trovi novan laboron kaj trovis ĝin en Kanbero, Aŭstralio. Li studis astronomion kaj ekhavis laboron pri komputiloj. Kial? Ĉar en astronomio oni uzas multe da matematiko. En oktobro de la sama jaro ni ĉiuj (tiam ni estis familio de kvin) persiĝe translokiĝis al tiu nova kontinento. Mi tre admiras miajn gepatrojn pro ilia kuraĝo replanti sian junan familion en nova lando.

Ĉar mia patro estis forte katolika

mi ekfrekventis katolikan lernejon (Rosary Demonstration School Watson) kun katolika preĝejo. Mi tre ŝatis miajn fruajn lerneajn jarojn, fakte ĉiujn miajn infanajn jarojn. Mi ofte aŭdas la aliajn paroli pri siaj infanjaraj problemoj en la familio kaj en la lernejo. Tiam mi ofte estas embarasata, ĉar mi memoras preskaŭ nur bonajn tempojn. Bonŝanco, ĉu ne? La lasta membro de nia familio – mia fratino Ruth, naskiĝis en Aŭstralio kiam mi havis sep jarojn.

Mi faris multajn interesajn kaj diversajn aferojn tiam. En tio inkluzivigas skoltinidoj kaj skoltinoj, naĝado, velboatado, muzikumado... Mi komencis iradi al kamparo/sovaĝejo por tendumi, marŝi, orientiĝi laŭ kompasoj kaj mapoj. Mi ŝatis ankaŭ la retpilkon kaj poste en miaj fraŭlinaj jaroj la korbopilkon. Ĝin mia patro ne ŝatis, ĉar parte pro ĝi mi forestis dum semajnfinoj, multe drinkis kun miaj tiamaj amikoj, festadis. Do fakte li pravis! Tio estis parto de mia plenkreskiĝo, sed ĝi pasis.

Post la elementa lernejo mi studis nur duonan jaron en kolegio sciencon. Sed mi ne estis kontenta, do mi foriris. Dum la sekva duonjaro mi laboris volontule kun homoj kun intelektaj problemoj en Melburno. Kaj la ideo vojaĝi kreskis en mi. Mi akceptis tedan laboron en iu butikoj, ŝparis monon kaj forvojaĝis — unue al Anglio, kie mi havis parencojn. Post iom

da tempo mi laboris volontule kun mense malsanaj infanoj en la bela montara Lago-Regiono. Por gajni monon mi 7vespere laboris en la proksima drinkejo.



Helen kaj familio

Post ses monatoj mi iris al Steiner-komunumo apud Aberdeen en Skotlando, por ankaŭ tie zorgi pri la infanoj kun intelektaj problemoj. En tiu bela loko laboris sufiĉe granda komunumo, konsistanta el homoj el multaj landoj. En “mia” granda konstruaĵo estis Brazilanoj, Danoj, Germanoj, Francoj, Sudafrikano, Finno, Svedo. La infanoj estis el Skotlando kaj Anglio. Mi restis tie unu kaj duonan jarojn kaj poste feris kun miaj novaj amikoj en Eŭropo.

Post kiam mi hejmeniris, baldaŭ mi kunloĝis kun mia nova amo Wolfgang Spielmeyer, kiun mi ekkonis en Skotlando. Ni decidis geedziĝi por ke li ricevu restadpermeson en Aŭstralio, (ankaŭ por povi resti kune).

Ni laboris en diversaj lokoj kaj klopodis gajni studlokon en Suda Aŭstralio. Li sukcesis. Mi ne. Mi estis ŝokita. Ni ambaŭ komencis aktivi en la kontraŭurania movado en Adelajdo. Post unu plia jaro mi komencis miajn flegistajn studojn.

Post kvar jaroj da kunvivado, Wolfgang kaj mi decidis disiĝi. Mi estis tre malfeliĉa kaj decidis translokiĝi. Tiam mi trovis “Seli-Hoo”, de tiu mia hejmo (mi renkontis miajn postajn kunloĝantojn de tiu domo en Roxby Downs dum protesto kontraŭ la grandega uranimumo).

En “Seli-Hoo” loĝis ankaŭ Ŝandor kaj Ashley. Ŝandor komencis esti mia “litvarmigilo” en 1987. Mi ricevis mian flegistan diplomon kaj eklaboris en Kanbero, kien mi iris jam kune kun Ŝandor. Mi ankaŭ komencis esti vicpatrino de Petra, la filino de Ŝandor. Bona, malbona, feliĉa kaj malfeliĉa parenco. Post Kanbero mi laboris ankaŭ en Adelajdo kaj havis multe da aventuroj kun Ŝandor. Petra malrapide kreskis. La komunuma kunvivado en Seli-Hoo daŭris, mi aĉetis parton de la domo.



Helen kaj Ŝandor

En 1993 malsaniĝis mia fratino. Ŝi havis kanceron. Nia familio kunvenis en Kanbero por helpi kaj kunesti kun ŝi en malsanulejo kaj en nia iama hejmo. Mia fratino mortis en aŭgusto de 1994.

Post ŝia morto mi decidis vivi mian vivon plene. Mi ĉesis labori en hospitaloj kaj komencis labori kiel

ĉefo de la butiko de la Sud-Aŭstralia Sovaĝeja Societo, kie mi ankaŭ volontulis. Interesa laboro kun multaj diversaj taskoj: aĉeti la varojn, fari la librotenadon, korespondi ktp. Mi lernis multon pri la malgranda komercado kaj ni gajnis multe da mono por la Societo kaj la sovaĝejo, kiun mi amas. Mi kaj Ŝandor ofte iris al sovaĝaj lokoj – ni marŝis, biciklis, mi tre ĝuis esti ekstere en tiu bela lando. Proksimume en 2000 mi decidis labori en tiu bela sovaĝa naturo kaj dumtempe mi komencis studi por esti medigardisto. Mia unua tia posteno estis en Nacia Parko Kakadu en Norda Teritorio, tropika lando. Ĝis nun mi laboris tie jam kvar foje. Mi laboris ankaŭ en Flinders Montaroj en Sud-Aŭstralio kaj rilate koalojn sur Kanguru-Insulo. Miaj postenoj daŭras kutime 2-5 monatojn. Kelkfoje mi faris ankaŭ iomete da volontula laboro. Multe da varieco. Sed mia hejmo daŭre estis “Seli-Hoo” en Adelajdo, Sud-Aŭstralio. Kelkfoje Ŝandor vizitis min en ‘miaj parkoj’. Estas bona vivo.



Helen en “sia” parko

Nun pri la esperanta lingvo: Ŝan-

dor, mia amo, parolas 6 lingvojn kaj defiis min lerni aliajn lingvojn, ne simple esti laca, aroganta angla-parolanto. Mi decidis lerni Esperanton. Mi lernis malrapide (malrapide, ĉar mi ne dediĉis al la lernado multe da tempo). En 2000 mi ĉeestis mian unuan Esperantan Somerlernejon en Sidnejo, poste du aliajn en Melburno. Mia lernado estis nur tiu dum la lernejoj kaj iom da parolado hejme kun Ŝandor. Per tiuj somerlernejoj mi trovis kelkajn eksterlandajn amikojn, ekzemple Grazina el Litovio (ŝi instruis min en Melburno). Ankaŭ mia patrino Pat lernis la lingvon. De tempo al tempo mi renkontiĝadis kun Adelajdaj esperantistoj, mi iris kun Ŝandor al Universala Kongreso en Zagrebo (kaj al la SAT-Kongreso en Nagykanizsa, Hungario). En 2004 la aŭstralian somerlernejon organizis ni, la Adelajdanoj. Tio estis multe da laboro, sed mi ĝenerale ĝuis ĝin — mi ĉiĉeronis, gvidis jogo-ekzercadon...

Sed la plej bona tempo por ĝui, lerni kaj uzi Esperanton estis por mi 2005. Tiam Pat, Ŝandor kaj mi havis grandan feriadon en Eŭropo. Ni feriiis kun Esperanto-amikino Sabine en ŝia orienta parto de Germanio. Ni iris al la UK el Vilno, Litovio. Por Pat ĝi estis la unua UK, ŝi ĝuis ĝin kaj poste vizitis siajn parencojn en Anglio. Ŝandor kaj mi biciklis en la norda parto de Litovio kun esperanto-amikino Grazina. Ni babilis, klaĉis ĉiutage. Poste ni iris al Somerlernejo en Bretonio, Francio kaj vizitis francan Esperanto-amikon. Ni uzis Pasportan Servon kaj gastis ĉe ĉarmaj esperantistoj. Je la fino de nia trimonata ferio mi miris, ke mi estis en Anglio nur du semajnojn kaj preskaŭ la tutan reston de la tempo mi uzis la lingvon Espe-

ranto por vivi kun homoj en Eŭropo.

Do, mia Esperanto estas uzata ĉefe por babili, mi ne ofte legas aŭ skribas en ĝi. Por mi ĝuste tiel ĝi gravas, pleje utilas.

Mi demandis iam francan esperantiston, kio estas laŭ li la diferenco inter la angla kaj esperanto (li bone parolis ambaŭ lingvojn). Li respondis, ke kiam li laboris en Hispanio, en sia libera tempo li klopodis viziti hispanajn esperantistojn. Li legis en la lasta

UK-ĵurnalo la adreson de unu tia, iris tien, frapis sur la pordon. La virino malantaŭ la pordo demandis, kiu estas tie. Li respondis, ke li estas esperantisto el Francio kiu estas en la urbo por unu tago. Ŝi bonvenigis lin, ili trinkis teon kaj babilis. Li diris al mi; “Se mi dirus ‘mi parolas la anglan lingvon’ – tio ne okazus”.

Do, por mi Esperanto temas pri amikeco, justeco kaj intereseco.

[Iomete reverkita el *Tamen Plu*] □

Via redaktoro en 1970

Nia artikolo pri Bob Felby kaj *Tamen plu* en *ESK* (septembro-oktobro 2007) inkluzivis fotojn de li kia li aspektis en 1970, kaj kia li estas nuntempe. Sekve de tio, ni ricevis peton de leganto de *ESK* presigi foton de via redaktoro Donald Broadribb el 1970, por povi vidi kia li aspektis antaŭ tiom da jaroj. Do jen la foto, farita en 1970:



Donald Broadribb, 1970

Kiel vi povas vidi, li tiutempe ankoraŭ havis brunan hararon, kaj (ĉu mirige?) aspektis multe pli juna ol nun. Espereble ĝi kontentigos nian petintan leganton, kaj eble ĝi respondos la scivolemon de aliaj legantoj ankaŭ. □

Sperto de Margaret Chaldecott

Mi kaj mia frato iris al Singapuro la 2an de Septembro por partopreni en solena memorservo en Malajzio la 4an de Septembro.

La okazo estis por memori tiujn kiuj mortis dum la japana marŝo suden al Singapuro. Nia onklo estis inter la mortpafitoj en malgranda vilaĝo Parit Sulong.

La 29an de Aŭgusto mi legis artikolon en *ENK* pri Frank Stephan, kiu nun loĝas en Singapuro. Post kelkaj retmesaĝoj inter mi kaj li, kaj malgranda problemo pri mia hotelo tie (kun la nomo Peninsula/Excelsior estis 2 turoj kun 2 apartaj enirejoj),

fine junulo vokis al mi: “Ĉu vi atendas la profesoron?”

Ni kvar — mi, Frank el Germanujo, malaja junulo kiu studas en Singaporo, kaj lia retamiko el Japanujo — iris per subtera trajno kaj piede al veĝeterana manĝejo en la hinda parto de la urbo

Frank jam invitis aliajn veni tien ankaŭ sed pro la subita invito, la aliaj ne povis veni.

Do — en hinda manĝejo sidis unu el Germanujo, unu el Malajzio, unu el Japanujo, kaj unu el Aŭstralio. Neniu estis vere loka loĝanto de la urbo!

Vere interesa vespero! □

Request for help in my research

First of all let me introduce myself, my name is Adi Bramasto and I am currently in the Fourth year of my study in the Department of International Relations, Faculty of Social and Political Sciences, Padjadjaran University, Bandung, Indonesia. You could check on the homepage of my University on:

<http://www.unpad.ac.id/>.

As the requirement to complete my study in the undergraduate program I am obliged to compose a thesis and the phenomena of Esperanto has gained my attention. I am planning to write a thesis entitled: “The Phenomena of Esperanto and its relevance toward Cosmopolitanism.”

The main problems of my research, which is also the main reason for me to write this message to you, is to get a proper understanding of

Esperanto and all of its elements and affiliations. And in order to achieve this besides doing researches upon literature I also intend to perform interviews toward peoples relevant to the development of Esperanto.

Upon this I with great humbleness ask you to be one of the informants for my research and by doing this you will contribute to socializing Esperanto in Indonesia because right now there are only very few Indonesian people know about Esperanto and as far as I know there hasn't been any Esperanto speaker in Indonesia. I will work on a formal request (signed by Head of the Department of International Relations) if you think that it is necessary.

Please reply to <rome_7hell@yahoo.com>. Your help will mean a lot to me and my country. □

Esperanto-Biblioteko kaj Muzeo raportas Kam Lee

Sabaton la 26an de Majo 2007, grupo de esperantistoj vizitis komercan konservejon en Fairfield, Melburno. Unu el la ĉambretoj en la teneja konstruaĵo enhavas la kolekton de la Aŭstralia Esperanto-Biblioteko en pakita stato.



Starante antaŭ la Aŭstralia Esperanto-Biblioteko, kiu nuntempe estas en provizora pakita stato. Oni povas dedukti, ke la translokiĝo de la libroj kaj rilataj aĵoj el Kanbero al Melburno estis sukcesa afero. Maldekstre estas Barrie Cledsmith kaj oni devas danki lin pro lia sukceso trovi bonan provizoran kaj sekuran lokon por la biblioteko. Espereble lia sendo de leteroj al diversaj bibliotekoj kaj rilataj konstruaĵoj rezultos en konstanta hejmo por la biblioteko.

La biblioteko antaŭe estis en eminenta loko en Kanbero, sed pro kelkaj kialoj, la esperantaj libroj kaj rilataj aĵoj devis esti forportitaj. La esperantaj aĵoj nuntempe havas provizoran lokon, malgraŭ malsukcesaj provoj trovi konstantan lokon en diversaj bibliotekoj kaj similaj konstruaĵoj en Melburno.

La teneja ĉambreto de la Esperanto-Biblioteko estis malfermita kaj montrita al entuziasmaj Esperantistoj dum unu horo. La enhavaĵoj estis zorge pakitaj en skatoloj, kies eksteraj flankoj ofte surhavis etikedon.

Oni povas rigardi multajn librojn de diversaj temoj, kiaj vizitoj al eksteraj landoj, fikciaj rakontoj, bildolibroj, poemoj, vortaroj, lernolibroj kaj tiel plu. Unu neantaŭvidita surprizo estis ke kelkaj skatoloj enhavis fotojn de ĉeestantoj en pasintaj kongresoj. Espereble ĉi tiu kultura trezoro estos rigardebla de la ĝenerala publiko en la proksima estonteco.



Rigardado al la valoraj enhavaĵoj de la Aŭstralia Esperanto-Biblioteko. Nur kelkaj el la skatoloj estis malfermitaj dum la vizito. Kie estos la konstanta loko de la Biblioteko?



La supra foto estas grupfoto de partoprenantoj de la Oksforda UK dum 1930. La mal-supra bildo estas grupfoto de la partoprenantoj je la Stokholma UK dum 1934.



• El la regionoj

Tas: Tasmanio (raportas Robert Budzul): Mi supozas, ke estas longa tempo ekde oni vidis raportaĵojn en *ENK* pri Esperanto en Tasmanio. Ni esperu, ke ĉi tiu ne estas la lasta kaj ni esperu ankaŭ, ke ni daŭre havos ion por raportiti.

La nura grupo en Tasmanio, laŭ mia scio, estas la universitata societo. Ni estas aliĝintaj kun AEA, kaj ankaŭ kun la universitato. Tiel ni havas ĉe la universitato videblecon kaj ankaŭ agrablan, senpagan klasĉambron por niaj lecionoj. Ni havas ankaŭ budon dum la tagoj de societoj ĉe la universitato. Dum la du societaj tagoj ni havis oportunon babili kun nekalkulebla nombro de studentoj, kaj efektive proksimume 40 lernantoj pagis por aniĝi al nia societo dank' al tiu okazo.

La pasintan jaron familio de Esperantoj el Tahitio vizitis nin kaj ni organizis vespermanĝon kun ili kaj ni (la hobartaj esperantistoj). Ni same

faris ĉijare dum la vizito de esperantisto el Japanio. Mi kredas, ke la duan okazaĵon proksimume 17 el niaj Esperantistoj venis. Bona afero por nova klubo...

Estas bone, ke la plejparto el niaj esperantistoj estas ege junaj, sed kompreneble tio ne estas surprizinda kiam oni memoras, ke nia grupo havas sian centron en la universitato.

Du el la lernantoj havas nur 15 jarojn. Ambaŭ komencis lerni Esperanton dum la somerlerejo. Ili partoprenis en la 3-taga kurso. Mi esperas, ke tio instigas pensojn por estontaj somerkursaroj.

Fakte, ĉiuj, kiuj venas al la lecionoj estas ege junaj — presau ĉiuj malpli ol 20-jaraĝaj, do tio donas esperon pri la estonteco de Esperanto en Hobarto.

Je la komenco ni havis lecionojn dufoje ĉiun semajnon (la saman lecionon dufoje), sed dank' al la nova lernohoraro en la dua duono de la

jaro, ĉiuj nun povas veni jaŭde do ni forigis la lundan lecionon kiel necesan.

Bona okazaĵo estas, ke dum la for-esto de la instruisto (mi, irinta (al la IJK kaj UK), la lernantoj estis tiel vig-laj, ke ili decidis daŭrigi la lecionojn sub la gvido de unu el la lernantoj, kiu komencis lerni jam dum la pas-inta jaro.

Ankaŭ rimarkinde estas, ke ili tiel volis kaj ĝuis la esperantumadon, ke ili insistis je daŭrigo de la lecionoj dum la universitataj ferioj.

Kun nia kerno de viglaj esperant-istoj ni verŝajne povos fari bonan montraĵon dum la venonta societa tago, do oni povas esperi, ke ni nur kreskos dum la venontaj jaroj.

Qld: Vizito al Caboolture: Jam estas tradicio en Toowoomba Esperanto-Societo ĝui mezjaran tagmanĝon kune, por memori la komencon de la universala kongreso en iu bela lando. Ĉijare la manĝo estis pli ĝuebla ol ku-time, ĉar anstataŭ restoracion ni vizit-is en Caboolture, la novan hejmon de membroj Linda kaj Petro Danzer, kaj Linda provizis por ni belajn ja-panajn manĝaĵojn.



Starantaj: Melissa, Sandor, Richard, John, Ra-iner, Elrae, Ruth, Ian, Paul, Luke, Jenny, An-drew. *Sidantaj sur la herbo:* Miranda, Emma, Carol, Luke, kaj niaj hundoj “Charlie” kaj “Angel”.

Ankaŭ esperantistoj el Connon-dale, Brisbano, Ormarbordo, Karana Downs venis por festi la tagon kun TES. Ni iomete aferkunvenis, kantis, babilis, rakontis, sed plejparte ni manĝis. Sendube la esperantistoj kiuj kongresas en Jokohomo havas mirin-dan sperton. Sed post nia manĝado de misosupo, suŝio, terijaka salmo, kuko el verda teo, kaj belaj akompan-aĵoj kaj saŭcoj, mi dubas ke oni po-vus ĝui la kongresan bankedon pli ol nian.



Post la granda manĝo
[el *Toowoomba Tereno* sept. 2007]

Vic.: La familianoj Lutz en Melburno estis membroj de la Pasporta Servo dum multaj jaroj. Ili gastigis esperant-istojn de multaj partoj de la mondo. Dum Septembro ĉi jare, Miranda gas-tigis paron el Svislando kiu vojaĝas en



tre interesaj partoj de la mondo ink-luzive Aŭstralio. Oni povas vidi bild-ojn pri la vojaĝo ĉe <http://voyages.pauxpe.name>. Dum ilia ĉeesto en Mel-burno ili vizitis kaj la Melburnan kaj la Sankta-Kildan Esperanto Kafo Klu-bojn kie ili renkontis geamikojn.

Oni lernas Esperanton ankaŭ en Nov-Kaledonio de Katarina Steele

Insulo Nov-Kaledonio, oriente de Aŭstralio, estas franca transmara teritorio.

Ĝi estas parto de Oceanio, kun 240 000 loĝantoj, el kiuj proksimume 44,8% melanezianoj, 33,6% eŭropanoj, 8,6% valizanoj (Valizo-Futunao estas alia pacifika teritorio de Francio), 3,2% indonezianoj kaj 9,8% aliaj.

La Jarlibro de UEA (2007) indikas tie unu delegiton: en ĉefurbo Nouméa, s-inon Léna Leroy.



Léna Leroy kun sia edzo

Léna lernis Esperanton en Francio en 2001. En Nov-Kaledonio jam tri-dekon da jaroj antaŭ ŝia alveno ekzistis esperantistoj. Kiam iliaj gvidantoj Lauxre kaj Gérard Mansel devis forlasi la insulon, la grupo disfalis. Léna

ekaktivis tie en 2003, komence kun tri novaj Esperanto-lernantoj kaj kelkaj el la antaŭaj esperantistoj. Ŝi sukcesis aperigi artikolon en loka ĵurnalo, kelkminutan intervjuon en la televido, faris diversajn publikajn demonstrojn kaj en oktobro de 2004 ŝia grupo havis jam 20 membrojn.

La esperantistoj kunvenadas regule ĉiusemajne en la gimnazio, kie unu el la gelnantoj laboras kiel instruistino. Ili iras tien ĉiun merkredon, eĉ kiam Léna ne ĉeestas. Nun ili estas entute 8, ĉar kelkaj forvojaĝis aŭ preferas plulerni memstare per la Reto.

La diversnacia grupo lernas per la speciala metodo de Léna, konsistanta el 9 lecionoj. Ŝi ne uzas lernolibrojn, nur fotokopiojn de *Ludoviko Zamenhof*, *Esperanto-lernolibro kun ekzercoj por progresantoj* (Lars Forsman, Karlskoga, Svedio, 1993), artikolojn ekzemple el *Monato* kaj kantadon. La grupo kune korespondas kun esperantistoj el pola urbo Radon.

La aŭklandaj esperantistoj planas subvencii kelkajn el la novkaledonianoj por venigi ilin al la Oceania Kongreso okazonta januare 2008 en Nov-Zelando. Ni esperu do, ke baldaŭ estos eblo persone ekkoni kelkajn niajn “kunoceaniajn” samideanojn. □

La maorioj, polinezianoj de Henry Broadbent

La artikolo pri la maorioj de Brian Fox en la septembro-oktobra 2007 *ENK* donas iun ideon pri la antikveco de la prapatroj de la maorioj. Tamen nur en la lastaj dudek jaroj oni mal-

kovris la plej gravajn prapatrojn de la polinezianoj.

Howard Barraclough (Barry) Fell estis novzelandano de skotaj gepatroj, kiu lernis la maorian lingvon dum

siaj mezlernejaj tagoj, kaj li ankaŭ lernis ke multaj maoriaj vortoj estas similaj al vortoj en lingvoj de la mediteranea regiono. Barry lernis multajn lingvojn, inkluzive de la antikva greka, sed iĝis tre sukcesoplena zoologia fakulo en la studado de la biologio de la planko de la oceano.

Tamen li ankaŭ pliigis sian intereson pri la centoj de epigrafoj sur rokoj kaj kavernoj tra Pacifiko kaj multaj lokoj tra la mondo. Li ankaŭ penis traduki iujn de la Maoriaj sagaoj kiuj la maoriaj junuloj ankoraŭ lernas, eĉ kvankam ili ne komprenas kion la antikvaj vortoj signifas. Iun tagon li subite komprenis ke grupo de vortoj en la sagao kiun li laŭtlegis havis signifon en la antikva greka. Malrapide plia kompreno kreskis ĝis Barry lernis traduki multajn el la epigrafoj.

Dum la mezsepdekjaroj Barry deĉifris la epigrafojn skribitajn sur la muroj de kaverno en insulo ĉe la okcidenta flanko de Nov-gvineo (nun Irian Ĝaja). Li demonstris ke la epigrafoj estis skribitaj en libia dialekto de la antikva egipta kaj establis ke tiu estas la bazo de la maoria lingvo.

La dato de la epigrafoj estas 232 a.K. (Li deduktis la daton el la informo ke la skribanto rigardis ringoforman eklipson de la suno tie). La nomo de la skribisto estas Maui, kaj la nomo de lia navigisto estas Rata. Novzelandanoj eble konas ke tiuj nomoj estas tiuj de maoriaj Dioj.

Maui skribis ke ŝiparo (ses ŝipoj) velis el Egipto ok jarojn antaŭe por veli orienten ĉirkaŭ la mondo, por pruvi la dedukton de Eratosteno ke la mondo estas sfero.

Barry Fell proponis serĉi aliajn epigrafojn en la okcidentaj flankoj de

la Amerikoj. Baldaŭ li lernis ke la germana-ĉilia esploristo Karl Stolp en 1885 kopiis epigrafojn kiujn li trovis apud Santiago en Ĉilio. La skribo estas simila al la alia skribo en la kaverno de la navigistoj. Ree ĝi estis de Maui kaj la dato donita estas la 16a jaro de Ptolemio 3a. Oni opinias ke tio estas 231a.K. Oni pretendis la landon de la altaj kaj longaj montoj por la Imperio de Egipto. Tamen kiel por Kolombo la tero obstrukcis la vojon orienten.

Min multe mistifikis la informo, ĉar ĝi indikas ke la ŝiparo velis trans Pacifikon en pli ol unu jaro kaj ankaŭ esploris laŭ la longa marbordo de la Amerikoj.

La ŝiparo evidente velis nordokcidenten el Santiago kaj vizitis Pitcairn-Insulon, kie epigrafo indikis ke ili marbatalis kontraŭ nigruloj, dum kiu ili perdis ŝipon. Tia estis la situacio je la fino de la tria jarcento a.K. Ŝajnis ke ili malaperis ien en la oceanon.

En la jaro 2000 kvinslandano Ross Perfect uzis la glosaron de Barry Fell, kiu bedaŭrinde mortis en 1996, kaj tradukis alian epigrafon sur la klifoj de Pitcairn-insulo. Tie la egiptoj kronikis la lunan eklipson, kaj indikis la daton 13a de decembro de la 16a jaro de la regno de Ptolemeo 3a. Sed Ross havis problemon, ĉar la egiptistaj historiistoj indikis ke la dato estis 231a.K., sed la astronomoj konstatis ke la eklipso okazis je la 3a de decembro de la jaro 233a.K. Finfine Ross trovis ke la regno de Ptolemeo 3a komenciĝis ne kiam lia patro mortis sed du jarojn antaŭe kiam li kunregis kun sia patro. Problemo solvita, kaj ankaŭ mia problemo ankaŭ estis solvita. Nun sendube la ŝiparo esploris trans la oceano, laŭ la marbordoj

de la Amerikoj por sep jaroj, poste anstataŭ veli pli sude ili evidente decidis retroveli al Egipto.

Sed kial ili neniam revenis al Egipto? De tiu punkto la historio estas ne certa sed mi sugestas la sekvantan:

Dum la jaro 2001 mi legis interesan libron verkitan de kuracisto Stephen Oppenheimer: *Eden in the East*. Ĝi traktas pri la vera loko de “Eden”, kiun li sugestas esti la lando ĉirkaŭ Indonezio, sed antaŭ ol la altiĝo de la maro leviĝis je 120 metroj al la nivelo kiu ĝi nun havas.

En la libro Oppenheimer kronikasian viziton al la etaj insuloj Wuvulu kaj Aua, lokitaj proksimume 150 km norde de Wewak en Papuo-Novgvineo. Lin surprizis trovi ke la popoloj estas polinezianoj, ĉar la insuloj situas 1300 km okcidente de la plej proksimaj polineziaj insuloj.

Alia epigrafo sur kaverno en la eta insulo Wamera — de la insulo D’entrecasteaux insulo super la orienta pinto de Papua Novgvinio — indikas ke la ŝiparo velis hejmen laŭ la norda marbordo de Novgvineo kaj kredeble vizitis Wuvulun kaj Auan.

Ĉar Maui kaj Rata estis rigardintaj la eklipson, mi opinias ke ili havis problemon konvinki la maristojn retroiri al Egipto. Sendube la ŝipanaro estis junuloj kaj ili estis velintaj dum multaj jaroj trans la oceanon kaj inter la insuloj. En la oceano estis multaj malgrandaj insuloj kun la loĝantaro kreskanta tro multe por la grandeco de ilia insulo. En 233a.K. la loĝantaro de la eta insulo Tikopia jam loĝis tie 700 jarojn post sia alveno. Ili estas la posteuloj de la “Lapitaj popoloj” kiuj komercis argilajn potojn laŭ la insuloj el sudorienta Azio. Ili restigis la

popolon je ne pli ol 1200 personoj per la uzo de drakonaj metodoj. La kroniko sur la klifoj de Pitcairn-insulo pruvas ke la ŝipanaro jam sciis ke la grandan insulon okupis nigruloj (melanaziaj) kiuj forte forpuŝis iun ajn kiu penis viziti ilin, do la Egiptoj nur vizitis malgrandajn insulojn, kiel Tipokian.

Do se ili alvenis al Tipokia mi opinias ke la junuloj trovis ke ties *wahinoj* kiuj ne permesis naski infanojn estus tre fervoraj edziniĝi al la virecaj egiptoj kaj veturi kun ili al alia loko. Se ne Tikopia do alia insulo; sed Tikopia estas apuda al la granda cirkla linio el Pitcairn-insulo al Novgvineo, kaj la lapitaj popoloj estas unu el la sugestoj pri la pragepatroj de la polinezianoj.

Do Maui kaj Rata rigardis la eklipson kaj poste la ŝipanaro sendube decidis ke ili devus trovi bonan lokon por siaj edzinoj, el kiuj multaj certe gravediĝis, kie ili povos naski bebojn. Kien iri? Certe al la etaj insuloj Aua kaj Wuvulu. Do en frua 231a.K. la unuaj idoj de la veraj polenezianoj estis naskitaj. Pri tio mi ne havas iun ajn dubon.

Kaj Maui kaj Rata estis alte edukitaj homoj kun sciencaj ekipaĵoj kaj scio por navigi la mondon, kio ne okazis ree ĝis 2000 jaroj poste. Ili sciis ke en la oceano estis multaj liberaj insuloj por doni interesajn vivojn por ili kaj iliaj posteuloj. Malmulte mirigas ke tiam komenciĝis la disigo de la polinezioj tra tuta Pacifiko. La lingvo de la Mauri-loko de Libio iĝis la lingvo de la polinezianoj kaj finfine la nomo de la Novzelandanoj iĝis la nomo de la lando de la vira flanko de la prapatroj. La moro de la egiptoj saluti per nazkiso nun

daŭras inter la maorioj en Novzelando.

La polineziaj kleraj homoj retenis la skribitan lingvon ĝis antaŭ 100 jaroj. La pentraĵo fare de Gaugin havas malantaŭ la *wahino* skribon kiu laŭ

traduko de Barry Fell diras la samon kiel la titolo kiun Gaugin skribis en la franca. La maorioj, la polinezianoj, havas fieregan historion.

Ref.:

www.21stcenturysciencetech.com □



Instruado de Esperanto en la lernejoj de Perto de Katarina Steele

LA KOMENCO



Idyss Einihovici estis poldevena aŭstralianino, kiu ege fervore propagandis Esperanton. Pli sia ideo instrui la lingvon en ele-

mentaj lernejoj, ŝi sukcesis persvadi kelkajn lernejestrojn de la Montessori-lernejoj, kies celoj kaj metodoj malsamas de la “ordinaraj” ŝtataj lernejoj kaj kiuj estas pli malfermitaj al bonaj sed nekutimaj edukaj ideoj.

TREVOR STEELE



En 1996, invitite de la fervora kaj bonhava Idyss Einihovici, venis al Perto Trevor Steele. Pagate de Idyss li instruis Esperanton en 3 Montessori-lernejoj: Fremantle, Riverlands & Perth. Temis pri

granda kvanto da lernantoj 3- ĝis 12-jaraj, kiuj ricevis dum 10 monatoj ĉiusemajne po 1 leciono 15-30-minuta.

Ju pli junaj la infanoj, despli granda estis la entuziasmo. Ankaŭ la instruisto-kolegoj ĝenerale bone akceptis la instruiston kaj lian studobjekton. Al kelkaj el ili, ekzemple al Sheryl Ridout, Trevor instruis Esperanton proprainciate. Fine de la lerneja jaro okazis eta konkurso inter la lernantoj de la 3 lernejoj kaj kunveno kun prezentaĵoj kaj kunkantado de la infanoj.

SHERYL RIDOUT



Post la foriro de Trevor en la Perth Montessori-lernejo transprenis la instruadon de Esperanto Sheryl Ridout. Ŝi aktivis proksimume de la komenco de la 4a instruarkvarono de 1997 ĝis la fino de la

4-a jarkvarono en 1999. En la Montessori-lernejoj estas klasoj kun pluraj aĝgrupoj samtempe. Tiel Sheryl instruis proksimume tridekon da infanoj 6-9-jaraj kaj 20 aĝantajn inter 9-12-jaroj.

Ĉiu grupo havis po 1 leciono semajne, sed tiu daŭris la tutan posttagmezon kaj la klaso estis dividita je malgrandaj grupoj. La instruistino uzis *Esperanto por infanoj* de G. Gladstone Solomon, sed la plejparton de la ekzercomaterialo ŝi preparis mem.

PATRICIA O'CONNOR



La elementa lernejo Deanmore estas unu el la Perthaj lernejoj, en kiuj okazas speciala instruado al aparte interesataj

kaj talentaj infanoj (PEAC, Primary Extension And Challenge – nun: TAGS, Talented and Gifted Students). Kadre de ĝia programo Trish O'Connor gvidis 9-semajnan kurson en junio-aŭgusto de 1999, titolitan “Esperanto kaj arto”. La instruado okazis po du horoj semajne kaj partoprenis ĝin 16 lernantoj 8-12-jaraj.

En la Perth Montessori-lernejo Trish instruis Esperanton dum la lerneja jaro de 2000. Ĉiusemajne 1 lecionon ricevis entute proksimume 60 infanoj, dividitaj al 6 grupoj: 3 grupoj de 3-6-jaruloj (30-minutaj lecionoj), 2 grupoj de 6-9-jaruloj (45-minutaj lecionoj), 1 grupo de 9-12-jaruloj (55-minutaj lecionoj). Uzitaj estis *Esperanto por infanoj* de G. Gladstone Solomon, *The Esperanto Teacher* de Mason Stuttard, angla-esperanta vortaro kaj ekzerco-folioj preparitaj

de Trish mem.

Fine de la jaro 2000 la mono en la fondaĵo de la intertempe forpasinta Idis Einihovici elĉerpiĝis kaj en la sekva jaro la lernejo enkondukis la instruadon de la indonezia.

Aparta aktivaĵo de Trish estis la preparo kaj prezento de ses 30-minutaj Esperanto-lecionoj por komencantoj, kiuj estis prezentitaj al la ĝenerala publiko posemajne en februaro-marto de 2000 per la televida Kanalo 31 Perth kaj Kanalo 31 NSW. La filmado okazis kadre de la instruoprogramo por la triagrada edukado (TAFE, Tertiary And Further Education) “TAFE Television”. La vidbendo aĉetebblas ĉe “TAFE Television” aŭ prunteblas en Okcidentaŭstraliaj publikaj bibliotekoj.

PENELOPE VOS



En 1997 Penny estis vicestrino de sendependa, alternativa mezlernejo Foothills. Kvankam dum kelkaj jaroj oni instruis tie la japanan, neniu forlasis la lernejon kun utiligebla scio de la lingvo. La oftaj sugestoj pri ŝanĝoj ne estis konvinkaj, sed fine la estraro decidis serioze konsideri kial iu lingvo indus esti instruata kaj, konsekvence, kiu lingvo pleje taŭgus. La plej gravaj kriterioj por elekto estis:

- la komunikeblo kun neanglaparolantoj de la mondo,
- helpo al la defio, kiun alfrontas en Aŭstralio la enmigrintoj,
- kono de io speciala, kion en Aŭstralio ne multaj scias,
- gajno de memfido pri la regado de

la angla.

La estraro de Foothills decidis, ke teorie pleje taŭgus Esperanto, sed post kiam Trevor foriris el Perto, instruisto kun necesa kvalifiko ne haveblis. Tamen, Penny volontulis lerni kaj instrui preskaŭ samtempe, kaj la programo komenciĝis. Ĝiajn financajn kondiĉojn certigis denove Idis Einihovici.

Dum 1997-99 Esperanto estis deviga lernobjekto en la 8-a klaso, elekt-ebla en la aliaj kaj lernis ĝin entute 50-80 infanoj. Inter alie la lernantoj ĝuis perkomputilan korespondadon kun la svislanda klaso de Vera Zaslavsky. Ili ege ŝatis uzi la retfilmlon, vidi siajn svisajn amikojn moviĝi, komuniki kun ili rekte, parole.

En 2000 Penny ekinstruis Esperanton en 2 klasoj de la Treetops-lernejo. Esperanto iĝis tie parto de la normala studtemaro en 2001 kaj tiel restis ankaŭ en la sekvanta jaro. Tiamaniere ĉiujare lernis la lingvon proksimume 150 lernejoj.

TREETOPS

En Treetops Montessori-lernejo oni instruis dum la jaroj jam kelkajn lingvojn, en la lasta tempo la indonezian. Malgraŭ la diversaj provoj nek la lernantoj, nek iliaj gepatroj kaj eĉ ne la lerneja stabo entuziasmis pri la lingvolernado ĝenerale. En 1999 la etoso estis forte kontraŭlingva.

La aktuala direktorino de la lernejo estas Carol Brands. Ŝi multe eksciis pri Esperanto de Penny Vos. Carol estas sendependa pensulo al kiu imponas la logiko kaj justeco de Esperanto. Esperanto estas lingvo servanta la pacon — ankaŭ tio kongruas kun la Montessori-filozofio. Ĝi estas pli facile lernebla ol la aliaj lin-

gvoj, havas propedeŭtikajn valorojn ktp. Pri tio ĉio paroladas Carol nun jam de jaroj al la gepatroj, kiuj volas enskribigi siajn infanojn al la lernejo. Ŝi klarigas al ili kial Esperanto gravas kaj ke ĝi estas firma parto de la instruprogramo.

SAANI BENNETTS



Saani estas juna instruistino, kiu laboris en Treetops de 2003 ĝis 2005. Ŝi instruis tie arton, muzikon kaj dramon al lernantoj 4-15-jaraj. Laborante ankaŭ en alia lernejo ŝi havis spertojn pri kelkaj aliaj studobjektoj, sed ne pri la lingvoinstruado.

En 2003 Penny foriris el Perto. Ĉu ĉesigi la Esperanto-kursojn aŭ ĉu iu kapablas daŭrigi ilin? La sola ebla solvo estis Saani, kiu tiam nur antaŭ 6 semajnoj komencis lerni Esperanton. Ŝi jesis kun timo. “Mi ne havis spertojn kaj estis neniu, kiu konsilus min. Necesis provadi, lerni per sukcesoj kaj eraroj. Ĝenerale la pli junaj lernantoj ŝatis la Esperanto-lecionojn, sed la 13-15-jaruloj ne. Sed ĉiu el ili, ĉiusemajne, havis de ĝi po 1 leciono.”

En 2005 la Aŭstralia Esperanto-Asocio per speciala fonduso ebligis al 5 junaj Pertaj instruistinoj partopreni la 2-semajnan Esperanto-somerkursaron en Adelajdo. Unu el ili estis ĝuste Saani. Venis ankaŭ ŝia koleginino Merradean Pettit, kiu tiam nur komencis la lernadon de Esperanto.

Saani decidis organizi por siaj Esperanto-lernantoj vojaĝon al eksterlando. Sed kien? Ŝi konsiliĝis kun Penny kaj uzante ŝiajn kontaktojn alcelis Svislandon.

VOJAĜO AL SVISLANDO

En 2005 venis al la lernejo Treetops letero de Vera Zaslawsky el La Chauv de Fonds, Svislando. Ŝi estis estrino de la privata lernejo Le Grande Ours (La granda urso) kun 25-30 lernantoj, kiuj lernis inter alie Esperanton. Vera invitis la Aŭstraliajn infanojn al vizito en Svislando. La infanoj el la du lernejoj komencis korespondi kaj Saani kun la helpo de Merradean Pettit, nomata nur Mo, ekis la monkollektadon. La subteno venis de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, de la Esperantoligo de Okcidenta Aŭstralio (ELWA) kaj de la Montessori-lernejo Treetops mem.

En oktobro de 2005 naŭ 10-13-jaraj Esperanto-lernantoj el la Perta Treetops-lernejo pasigis 2½ semajnojn en Svislando. Gvidis ilin Saani kaj Mo, kun la helpo de patrino de unu el la infanoj — Annolies.

“La vojaĝo estis longa, laciga. Post la alveno ni estis loĝigitaj ĉe familioj kaj jam de la dua tago ni partoprenis po 4 Esperanto-lecionojn en la lernejo de niaj invitintoj. Posttagmeze ni ekskursis. Ni iris al lagoj, muzeoj, bestoĝardeno, kaj por la aŭstraliaj infanoj estis aparte ekscite viziti kastelojn. La duan semajnon kaj la ursoj (svisaj infanoj) kaj la kanguruoj (la aŭstralianoj) kune kampadumis en la montoj. Ni loĝis en eta kabano kaj la antaŭtagmeza programo daŭre estis la Esperanto-instruado fare de hungarino Monika Molnar kaj la loka Anke. Poste estis multe da ludado, teatrumado, panrostado super fajro.”

“La infanoj bone intermiksiĝis. Ĉar la svisoj ne parolis la anglan (ili komencas ĝian lernadon 15-jaraj) kaj la aŭstralianoj konis nek la francan,

nek la germanan, ili devis uzi Esperanton. Komence estis por ĉiu malfacile, sed ĝis la fino de la 2-a semajno ilia memfido multe kreskis. Niaj etuloj revenis al Aŭstralio plenaj de entuziasmo pri Esperanto kaj per ĝi ili infektis ankaŭ tiujn, kiuj restis hejme. Iliaj rakontoj pri la travivaĵoj ege motivigis la aliajn al la lernado.”

“La natura sekvo estus gastigi la svisojn en Perto, sed, bedaŭrinde, ili ne venis. Tamen, la infanoj restas kun siaj eŭropaj amikoj en koresponda kontakto.

Dekomence ni diradis al la infanoj, ke Esperanto utilas al interkomunikado kaj vojaĝado. Nun ili spertis tion en la praktiko. La infanoj tre ŝatas vojaĝi, ili volas vojaĝi kaj nun ili jam kredas, ke Esperanto helpas ilin en tio. Niaj nunaj etuloj lernas jam ĝuste por povi vojaĝi.” — diras Saani.

MERRADEAN - MO

Post 3 jaroj da Esperanto-instruado en Treetops Saani forlasis la lernejon. Ŝian rolon transprenis Mo. Ŝi komencis lerni Esperanton en januaro 2005 en Adelajdo. Sen granda fido al sia esperanta lingvokapablo, ŝi unue intencis subteni Esperanton ne per ĝia instruado, sed per instruado pri ĝi — ekz. kadre de siaj lecionoj pri politiko, historio k.s., sed la svislanda vojaĝo donis al ŝi spertojn, post kiuj ŝi jam kuraĝis alfronti la malfacilan taskon de Esperanto-instruado. Ankaŭ ŝiaj komencoj estis malfacilaj, same kiel por ŝia antaŭulino.



Mo uzas por la instruado la ŝtatan programon “Language Teachers Curriculum”. Ĝi estas deviga, sed servas nur kiel kadro. En la Montessori-lernejoj oni substrekas la instruadon laŭ la individuaj ritmoj de la infanoj, do ne ĉiu faras samtempe la saman taskon. Ankaŭ al Mo utilas la uzo de *Esperanto por infanoj* de G. Gladstone Solomon, *The Esperanto Teacher* de Mason Stuttard kaj krome la tasklibro *Komencu* de Aniondra Franz.

Ĉe la pli junaj lernantoj oftas kantoj, ludoj, sportado, manlaboraĵoj ks.

Laŭ la Montessori-sistemo oni ne poentumas. La instruistoj nur priskribas la laboron de siaj lernantoj, ne juĝas ilin, ne komparas kun la aliaj. Tamen, lastatempe la aŭstralia registaro postulas fari raportojn pri la atingoj de la infanoj, alie la lernejo perdos la ŝtatan subvencion.

Pasintjare do (2006) en Treetops lernis Esperanton 150 lernantoj 4-15-jaraj. Ili havis po unu 45-60-minuta leciono semajne. De ĉijaro la lernejo alprenis la instruadon de 16-17-18-jaraj geknaboj. Kadre de la programo “Internacia bakalaŭreco” oni instruas al ili la hispanan. Sed Mo havas alian ideon: kial ne Esperanton? Por lerni nian lingvon per “Internacia bakalaŭ-

reco” necesas, ke tutmonde lernu ĝin almenaŭ 200 lernantoj.

Konsciante, ke ŝi mem ankoraŭ ne tute regas la lingvon, Mo decidis ĉirkaŭigi la lernantojn per Esperanto venigante ilin al la ĉijara Aŭstralia Sommerkursaro en Tasmanio. Inter Perto kaj Hobarto estas granda distanco kaj du semajnoj kostas ne malmulte. La helpo venis denove de AEA (ĝi pagis la loĝadon, manĝadon, kurskotizon de la infanoj), ELWA (donis po A\$250 por la vojaĝkostoj de infanoj) kaj de Treetops mem (pagis la elspezojn de la instruistino). La 9 infanoj estis 10-13-jaraj, 5 el ili estis ankaŭ en Svislando. Ĉifoje Saani rolis kiel helpanto de Mo.

“La infanoj ĉi tie rapide progresas” — diris Mo en Hobarto. “Ili partoprenas la regulajn antaŭtagmezajn lecionojn kaj kelkfoje havas instruadon eĉ posttagmeze. Unu el la knabinoj kuraĝis ĉeesti eĉ la 3-a-nivelan instruadon.”

FINO?

Evidente ne, la Esperanto-instruado ja daŭras kaj Mo kun Saani jam planas novan Esperanto-vojaĝon. Ni esperu legi pri ĝi en la baldaŭa estonto kaj pri la lerneja Esperanto-instruado en Perto ankoraŭ dum multaj jaroj. □



• Skribas la legantoj

Margaret Chaldecott skribas:

En sia libro *Kanako el Kananam*, Ken Linton ofte uzis aktivajn participojn ĉe la komenco de frazoj. Kelkaj personoj kritikis tian uzadon, ĉar ili pensis ke estis tro da tiaj verbformoj.

Sed en libro de William Griffin pri C. S. Lewis, li skribis en unu alineo de 15 frazoj aron da frazoj kiuj ĉiuj komenciĝis per -intaj participoj, pri kiel amiko de Le-

wis ŝanĝiĝis de nekredanto al kredanto

“Forlasinte ĉiujn spurojn de panteismo ...; Ricevinte komuniojn; Leviĝinte de siaj genuoj....; Trovinte apude anglo-katolikan preĝejon ...; Aŭdinte maljunan sacerdoton prediki...; Trovinte anglo-katolikismon ...; Trovinte katolikan eklezion; Pasiginte ses semajnojn ...; Ricevinte en la katolika eklezio ...”

Nu, opinioj kaj gustoj pri stilo varias. Mi

mem ne trovas la verkon de Ken Linton stile modela — laŭ mia propra tre subjektiva opinio, li ne estis imitinda verkisto; la verkon

de William Griffin mi ne konas. Tamen, mi komprenas ke diversaj personoj povas diverse opinii pri stiloj. — [ab] □

La Ĝenerala Jarkunveno Brisbano — Oktobro 2007

La jarkunveno de AEA sukcese okazis dum sabato la 6a de Oktobro en Brisbano, kun 24 partoprenantoj. La kunveno daŭris kelkajn horojn nur sabate, do dimanĉe la esperantistoj kunvenis por diskuti diversajn esperantajn eventojn kaj projektojn kaj viziti la belan Brisbanon.

Grava anonco estas ke la voĉdono pri la nova statuto estis akceptita per 78 voĉdonoj por kaj 10 voĉdonoj kontraŭ la propono.

La novaj estraranoj estas:

Prezidanto — Igor Couto
Vicprezidanto 1 — Jonathan Moylan
Vicprezidanto 2 — John Abood
Sekretario — Miranda Lutz
Vicsekretario — Gordon Coleman
Kasisto — Steve Pitney
Vickasisto — Jenny Bishop

La nova estraro bonvenigas komentojn kaj voluntulojn por helpi pri AEA aferoj. □

Annual General Meeting Brisbane — October 2007

The AGM of the AEA was successfully held during Saturday the 6th of October in Brisbane with 24 participants. The meeting lasted for several hours only on Saturday, therefore on Sunday the Esperantists meet to discuss various Esperanto events and projects and to visit beautiful Brisbane.

An important announcement is that the vote about the new constitution was accepted with 78 votes for and 10 votes against the proposal.

The new estraro members are:

President — Igor Couto
Vice President 1 — Jonathan Moylan
Vice President 2 — John Abood
Secretary — Miranda Lutz
Vice Secretary — Gordon Coleman
Treasurer — Steve Pitney
Vice Treasurer — Jenny Bishop

The new estraro welcomes comments and volunteers to help with AEA matters. □

Indekso 2007

85 = januaro-februaro

86 = marto-aprilo

87 = majo-junio

AEA:

Anonco de la Ĝenerala Jarkunveno 90:7
Esperanto Federation of Victoria (Henry Broadbent) 85:2

Estraro de AEA 2007 86:10

Ĝenerala Jarkunveno oktobro 2007 90:26

Kasraporto 86:20

Kio okazas inter Aŭstralia Esperanto-Asocio

88 = julio aŭgusto

89 = septembro-oktobro

90 = novembro-decembro

kaj Esperanto-Federacio de Viktorio (Franciska Toubale) 85:7

La Ĝenerala Jarkunveno — Brisbano oktobro 2007 90:28

Message from the Secretary 87:29

Notice from the AEA secretary 88:9

Perpoŝta voĉdonado (Miranda Lutz) 85:10

Poemkonkurso en Viktorio 90:9

- Prepare por la Somerlernejo/Jarkunveno 2007 (Marcel Leereveld) 85:1
 Protokolo de la Ĝenerala Jarkunveno januaro 2007 86:23
 Provizora tagordo de la AEA jarkunveno 85:10
 Raporto de la komisiito pri ekzamenoj (Marcel Leereveld) 86:17
 Somerkursaro 7-19 janaro (Marcel Leereveld) 85:8
- Artikoloj:**
 Aŭstralia-Brazilia projekto (Stephen Pitney) 85:20
 Bonan ŝancon ĉe Radio 3ZZZ (Jennifer Bishop) 30:21
 Ĉu la libroservo ankoraŭ estas servo? (Nicole Else) 85:22
 Dalai-lamao disdonis Tinĉjon en Esperanto 86:10
 Instruado de Esperanto en la lernejoj de Perto (Katarina Steele) 90:23
 Instrui en Itahari (Franciska Toubale) 88:4
 Internacia fotokonkurso de la gazeto La Ondo de Esperanto 90:15
 Kongresu en Aŭklando (Brian Fox) 90:3
 La 7a himalaja renkontiĝo (Franciska Toubale) 88:3
 La jaro de la hundo (Andrew Soos) 88:23
 La oceania migrado de la maorioj (Brian Fox) 89:23
 La maorioj, polinezianoj (Henry Broadbent) 90:20
 Laŭ mia vidpunkto: Bahaa dilemo (Paul Desailly) 87:7
 Neforgesebla sperto (Franciska Toubale) 87:26
 Oni lernas Esperanton ankaŭ en Nov-Kaledonio (Katarina Steele) 90:20
 Por pensumi (Mike Leon) 87:9
 Prelego pri Esperanto en Universitato de Sidnejo (Nicole Else) 85:23
 Skoltado centjara (Gwenda Sutton) 88:22
Tamen plu dudek kvin jarojn (Katja Steele) 89:12
 Traktato de Waitangi (tr. Brian Fox) 89:29
- Biblioteko:**
 Competition to find name for the AEA libraro (Barrie Cledsmith) 87:22
 Esperanto-biblioteko kaj Muzeo (Kam Lee) 90:17
 Konkurso por nomi la AEA bibliotekon 89:16
 La biblioteko de AEA (Hugh Malcolm) 85:19

Dramoj:

- Hejmuldo Kabul 88:17
 La ĝemoj de ĝemeloj (Margaret Chaldecott) 85:11
 Spacaj vizitantoj al Christchurch (Howard Gravatt) 87:18

DVD-oj:

- Nova DVD: Esperanto elektronike 88:14

El la regionoj: 86:12, 88:18, 89:9, 90:18

- Kanto-vespero en Suda Aŭstralio 89:12
 Melbourne Esperanto Coffee Club 88:21
 Ni kaj "Harmony Day" 88:18
 Nicole Else ricevas diplomon 88:19
 Poemkonkurso en Viktorio 89:9
 Raporto pri Tasmanio 90/18
 Viktorio kaj WA festas la Zamenhof-feston 86:12
 Vintra kunveno en NSW 87:27
 Vizito al Caboolture 90:18
 Werribee skulptajparko 88:20

Esperanto:

- 9a Oficiala Aldono al la Fundamento 87:12

Filmoj en Esperanto

- Du novaj filmoj en Esperanto 90:5
 DVD-filmo kun voĉigita traduko al Esperanto 88:13

For the Beginner:

- "After" and "Before", Names of Countries, Plua/Plia Donald Broadribb 88:27
 What is an "official" word (Donald Broadribb) 87:28

Fotaroj:

- Photos por *ENK* 89:17
 Somerlernejo en Hobarto 86:9
 Torki Esperanto Kafo-klubo 86:9

Interrete:

- 2 Esperanto-radioj 87:11
 Atentu viajn respondojn 86:13
 Aŭstria nacia biblioteko — foroarkivo 88:16
 e-libroj elŝuteblaj ĉe www.gutenberg.org 85:16
 Esperantaj poŝtmarkoj 90:11
 Esperanto-vortaroj 87:16
 Excellent Introduction to Esperanto 87:10
Firefox nun en Esperanto 90:11
 Folkloraj kantoj aŭskulteblas 90:11
 Fondaĵo Ivo-Lapenna, hejmpaĝo 87:12
Ifigenio en Taŭrido elŝutebla 90:11
 Ilustrita listo de esperantaj poŝtkartoj 90:11

La Mi-Klono1 87:10

La Societo Kalocsay 87:10

Linukso 88:16

Listo de rete atingeblaj Esperanto-asocioj 90:11

Mark Twain in Esperanto 87:25

Melburna esperanta kafo klubo 88:16

Nova retejo pri gazetoj 90:1

Nova retforumo aŭstralia 90:11

Nova retprojekto efektiva 89:7

“Parolu, mondo” 88:16

Per www.amikumu.com 87:10

Podkasto 88:16

Por saĝe elekti libron 90:11

Radio-programoj per Broadband 87:12

Speologiaj informoj ankaŭ en Esperanto 87:11

SBS pri Esperanto 86:14

The Mailbox is Full 88:15

There's a Fun Game at 87:11

Veterana Esperantista Klubo 87:11

Vikicitaro: 17

Konu viajn gesamideanojn:

Ann Gash 89:20

Annie Gleeson 86:11

Brendan Linnane 87:24

Helen Palmer 90:12

Indrani Beharry-Lall 85:17

Muziko:

Vinilkosmo-novaĵoj 88:24

Nekrologoj:

Lloyd, Peter 85:2

Robertson, Robby 87:6

Smeets, René Auguste 86:18

Negrandaj informoj atentindaj:

Agado en Filipinoj (Hori Yasuo) 87:14

Ĉinio — Universitato Shenyang 88:30

Du gazetoj pripensindaj 90:10

Esperanto-instruisto serĉata por Respubliko Kongo 87:15

Internacia Virino-Tago 2007 97:13

Kantoj esperantaj 90:10

Konkurso “Esperanto kunligas nin” 88:30.

La avantaĝoj de urboĝemeligo per Esperanto 87:15

La Esperanto-movado en Ganao estas reorganiziĝanta 87:16

La unua...en Esperanto 89:9

Literatura konkurso internacia 88:12

Mi ŝatis en la Somerkursaro... (Katja Steele) 97:13

Nova UEA honoriga sistemo 90:9

Petoj 88:12

Polaj kaj germanaj infanoj dum du semajnoj en Herzberg 90:10

Request for help in my research 90:16

NZEA:

Nov-Zelando promesas varman kongreson (David Ryan) 88:10

Raporto pri kongreso de NZEA (David Ryan) 87:17

Personoj:

Donald J. Harlow honorita 90:9

Elĉiela vizitanto: Julio Calegari (Debra Mc-Carney) 85:30

Frank Stephen 89:22, 90:16

Jennifer Bishop honorita 90:9

Via redaktoro en 1970 90:15

Poemoj:

Gramdaĝeco (Gaye Phillips) 86:19

La saltego (Gaye Phillips) 89:11

Poŝtmarkoj esperantaj:

nova, el Israelo 86:19

Rakontoj:

“Dek-lira monereto” de Sen Rodin 87:3

Recenzoj:

A Handbook of Volapük and an Elementary Manual of its Grammar... de Andrew Drummond 88:6

Born on a Blue Day de Daniel Tammet 86:8

Ĉeĥa kuracisto en kodoro de Afriko 87:4

En la serĉo de la mondlingvo, aŭ interlingvistiko por ĉiuj de Alexandr Duliĉenko 86:5

Incubus 89:3

Kaj staros tre alte de Trevor Steele 86:3

La Tempo-maŝino de H.G. Wells 87:5

La unua vojaĝo de Mi Hu (Odlo Bokserp) [Serĉaĵo/satiro] 85:26

Vojaĝo en Esperantolando de Boris Kolker 89:8

Mi estas homo de L.L. Zamenhof 86:7

Neokazinta amo de Lena Karpunina 89:5

Samideanoj red. Aleksander Korĵenkov 88:9

Skribas la legantoj:

Alan Turvey 86:16

D. Gary Grady 87:23

Donald Rogers 86:14

Erhard Claus 86:15

Geraldo Mattos 86:15

Hugh Malcolm 86:15

Margaret Chaldecott 90/27

Universala Kongreso kaj IJK 2007 90:6

Universalaj Kongresoj 2008 & 2009 90:10

Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la januaro-februara numero: 5a de decembro 2007

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

esk@esperanto.org.au



La Aŭstralia Esperanto-Asocio

143 Lawson St • Redfern NSW 2016 • Aŭstralio

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Igor Couto | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: Miranda Lutz | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: Stephen Pitney | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$40 por individuo aŭ klubo [+ \$6 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$12.

Membrecpagojn sendu al sekretario@esperanto.org.au



La Novzelanda Esperanto-Asocio

P.O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Novzelando

<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: David Ryan | http://www.ryangomez@xtra.co.nz/

Kasisto: Don Rogers | don-cles@ihug.co.nz

Sekretario: Bradley McDonald | bradley.m@xtra.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo

(<20-jara: Klubo: \$1 por ĉiu ano

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

Novembro-Decembero 2007

if undeliverable return reply paid to
D. Broadribb • P.O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA

PRINT POST
PP631048/0005